

Kardinalo Miloslav Vlk

Antaŭ unu semajno mi prelegis pri libro de Sergej Dakov "Pardonu, Nataŝa!", kiu priskribis persekutadon de religianoj en Sovetunio. La ĉefan tradukon mi trovis en la reto en gazeto de dekanejo en Šumperk sub titolo "Odpust', Nataŝo" kaj kiam mi foliumis unu el la numeroj, mi hazarde trovis reklamon pri libro verkita en la franca de Alain Boudre *Laveur de vitres et archèveque*, kiun ĉeflingve eldonis Nakladatelství Nové město sub titolo *Umývač výloh a arcibiskup*. Sur la kovrilo mi vidis foton de nia kardinalo Miloslav Vlk kaj ĉar mi sciis, ke li estis esperantisto en sia juneco, mi komencis interesiĝi pri la libro kun scivolo, ĉu oni menciis lian esperantistecon. La libro aperis en 2016, kiam la kardinalo ankoraŭ vivis.

Mi konstatis, ke ĝi estas pruntebla en Moravia Landa Biblioteko en la teretaĝo, kie staras multaj bretaroj kun libroj, ĉi tiu estis sub la signo **27 Bou**. Mi efektive trovis la libron, pruntis ĝin kaj trovis ĉapitron *Esperanto kaj malhela kostumo*. Poste mi tralegis la tutan libron, por ke mi povu pri ĝi prelegi.

Miloslav Vlk naskiĝis en Šumava, Bohema Arbaro, en vilaĝo Líšnice, la 17-an de majo 1932 al fraŭlina patrino, do ekster edzeco. Nur en 1938, kiam la knabo estis 6-jara, la patrino edziniĝis kaj transloĝiĝis al Záluží, kie loĝis la edzo. La libro ne diras, ĉu la edzo estis biologia patro de la knabo aŭ ne, sed la kardinalo rememoras lin kiel sian patron. Kun aliaj infanoj li vizitadis lernejon en Chýŝky. Tie li vidis en vestiblo de la preĝejo afiŝon Ĉu vi volas fariĝi pastro? Tiam li ankoraŭ ne volis, li sopiris fariĝi piloto de aviadilo. Li sciis, ke li devus iri al gimnazio, sed la gepatroj diris al li, ke ili estas malriĉaj kaj ne povas sendi lin al gimnazio.

Kiam li estis 12-jara, li eksciis, ke iu knabo vizitas gimnazion senpage. Li biciklis al li por demandi, ĉu tio estas vero. Jes, en gimnazio en České Budějovice vi povas studi senpage kaj oni pagos por vi eĉ internulejon. Li petis la gepatrojn, ke ili permesu al lu fari eniran ekzamenon kaj li sukcesis. Nur poste li eksciis, ke per eniro en la senpagan internulejon li subskribis permeson fariĝi pastro. En la unua momento li estis ŝokita, li devis forlasi la revon pri pilotado de aviadilo. Sed kiam li vizitis sian mortantan baptopatrinon, tiu konfesis al li, ke portante lin al la preĝejo kiel unutagan bebon por bapto, ŝi promesis lin al Sankta Maria. Do bone, mi estos pastro, li decidis.

Li interesiĝis pri lingvoj, inter ili pri Esperanto pro la ideo de kunfratiĝo de ĉiuj popoloj, kaj ĉiutage preĝis preĝon *Patronia* en sep lingvoj. En la jaro 1946 komunistoj venkis en balotoj, certe pro danko al Ruĝa Armeo pro liberigo, sed kiam proksimiĝis novaj balotoj la 31-an de majo 1948, komunistoj ne atendis la rezulton, sed kaptis la potencon perforte jam la 25-an de februaro, do tri monatojn antaŭ la balotoj. Kaj ili komencis ataki antaŭ ĉio religiojn. Ili nuligis multajn monaĥejojn kaj monaĥinejojn, al pastroj forprenis la rajton fari di-servojn, ili devis peti la ŝtaton pri tiu permeso kaj esti lojalaj al la ŝtato, kiu ilin salajris. La studentoj en la gimnazio en České Budějovice en 1952 ricevis permeson fari abituriantan ekzamenon, sed devis veni en uniformo de la komunisma junularo. Miloslav Vlk rifuzis eniri en tiun organizon kaj venis antaŭ la abiturianta komisiono en nigra vesto. Kvankam lia ekzameno finiĝis per eminenta rezulto, oni skribis, ke li ne estas rekomendita daŭrigi studadon en altlernejo. Li komencis labori en fabriko.

En tiu tempo estis nuligita la tutŝtata esperantista organizo kaj la iniciaton transprenis la junularo. Ekestis multaj kluboj, kiuj kunvenis eĉ dufoje semajne, faris diversajn konkursojn, kiu estas pli aktiva, kaj havis ankaŭ distriktajn kaj regionajn reprezentantojn. La reprezentanto por la suda Bohemio fariĝis Miloslav Vlk. Sed poste li ricevis rekrutigan ordonon kaj devis soldatservi en Karlovy Vary. Ĉiam, kiam li ricevis liberon forlasi la kazernon, li devis elturniĝi antaŭ aliaj soldatoj, kial li ne iras kun ili bierumi en gastejo, kaj rapidis al preĝejo. Li fariĝis serĝento kaj estis konsiderata modela soldato, tial oni skribis por li rekomendon por la Karola Universitato, kvankam li ne estis membro de la komunista junularo. Li elektis Filozofian Fakultaton, fakon arkivado, ĉar tie li povis praktiki la latinan lingvon kaj tiel sekrete prepari sin por la pastra profesio.

Post kvin jaroj en 1960 li finas studadon kun ruĝa diplomo kaj fariĝas arkivisto en Ŝtata teritoria arkivo en Jindřichův Hradec. En 1963 la reĝima premo iom malfortiĝis kaj tial li petis, ke li povu studi teologian seminarion en Litoměřice. Komunistoj rifuzis lin liberigi el arkivo, sed li

minacis, ke li iros en minejon kaj de tie li sendos aliĝilon denove. La funkciuloj jam estis lacaj, ili liberigis lin sen adiaŭo. En 1964 li komencis studi la seminarion kaj dum Praga Printempo la 23-an de novembro 1968 li estis inicita kiel pastro en České Budějovice. Episkopo Hlouch nomumis lin sia sekretario. Dum la politika renormaligo la komunistoj volis dividi la klerikojn per movado *Pacem in terris*. Pri Patro Vlk senĉese zorgas la sekreta polico same kiel pri aliaj pastroj, ofta estas polica enketado de la paroĥestro kaj paroĥanoj. Vlk estas translokita al la paroĥo Lažiště en Ŝumava. Ĉar la homoj lin amas, komunistoj furiozas kaj sendas lin post duonjaro al Rožmitál pod Třemšínem, kie li restas sep jarojn. Ĉiujn malagrablojn li akceptas kiel signon de Dia amo, ke li proksimiĝas al la kruco de Jesuo. Vlk vizitas pensiulojn kaj gejunulojn, ambaŭ agadoj malplaĉas al la polico. Instrui infanojn pri kateĥismo estas ago kontraŭ socialismo, tial li perdas rajton esti pastro. Dum lasta meso li ĉion klarigas al la paroĥanoj, tiuj sendas protestajn leterojn eĉ al Gustav Husák, sed ĉio estas vana.

Ekde la jaro 1978 li fariĝas dungito de la Praga entrepreno Úklid kaj lia devo estas purigi la montrofenestrojn de butikoj. Baldaŭ li konvinkiĝas, ke tiu humiliga laboro donas al li eblon interparoli kun homoj surstrate. La homoj lin ĉiam akceptas kiel pastron eĉ en civila vesto, la polico lin observas, kiam li vizitas homojn en loĝejoj. Sed danke al perestrojko la premo denove ne estas tiom forta, kaj en 1986 li ricevis novan postenon en Ŝtata banko ĉeĥoslovaka, kie li restis ĝis 1988.

La 1-an de januaro 1989 li ricevas permeson labori denove kiel pastro en okcidenta Bohemio. La 14-an de februaro 1990 li estas nomumita episkopo kaj post morto de kardinalo Tomášek li anstataŭas lin. En 1994 li fariĝas kardinalo kaj en 2005 li partoprenis elekton de papo Benedikto la 16-a. En 2010 rezignas pri siaj funkcioj kaj anstataŭas lin kardinalo Dominik Duka. En 2013 estis elektita papo Francisko, sed tiam kardinalo Vlk estis en Romo nur kiel spektanto. Kiam li venis gratuli al la nova papo, tiu diris: "Ho, la purigisto de montrofenestroj!" Kaj konfesis, ke li legis pri li en la hispana lingvo.

La 18-an de marto 2017 kardinalo Vlk mortis pro kancero.